Esperanto
V-24224/3
(1936г)
N.25

DECEMBRO 1936
Prezo : 15 senoj

NUMERO 25.
Tria Jaro

MONATA **tempo** GAZETO

tempo 昭和11年6月20日 第三種郵便物認可 昭和11年12月23日印刷納本 昭和11年12月25日發行 (每月1回25日發行) 第25號

Redaktoroj : *Seija Iĉiki, T. Hattori, K. Kanĵa, K. Kondo, S. H. Macujama, R. Narita, K. Akata M. Ootani, K. Sisido, S. Toda, K. Uno.*
Administranto : *S. Nakahara.*

KYÔTO, 25 DECEMBRO, 1936.
Redakcio kaj Administracio : Librejo Kaniya, Teramati Ebisugawa, Kyôto, Japanujo
Internacia poŝt-ĉek-konto, Osaka 23404

ABONPREZO
Jarabono enlanda.......1.00 jeno
Jarabono eksterlanda. . .1.20 jenoj
aŭ 10 respondkuponoj

# Universalan Kongreson al Japanion !

— Nozima-Yasutarô —

Malhelega nubo densa kaj vasta nun premas la tutan mondon sub siaj nigraj flugiloj. Tie kaj ĉi tie tra fendoj de tiu netravidebla vastaĵo vidiĝas ruĝa paffajro, jen okcidente en Eŭropo, kaj jen, en fora oriento. Akra kontraŭstaro de "*la Ruĝo kaj la Nigro*", kiun eĉ *Stendahl* mem ne povus imagi, nun puŝfaligis la mondon en abismon de kaoso, el kiu ĝi neniam povus sin savi per la forto nur de si mem. Kaj nun la tuta mondo estas dividita en du partiojn kontraŭstarantajn. La linio kiu kuras oriento-okcidente laŭ la popolfronto de Sovetio ĝis Francio kaj Hispanio, kaj la linio kiu kuras nordo-sudo laŭ la faŝisma fronto de Germanio al Italio, nun kruciĝas sur la ĉielo de Eŭropo. Ankaŭ en fora oriento du kontraŭstarantaj grandaj potencoj, Sovetio kaj Japanio, konkuras sian armadon ĉiam pli grandskale. Kaj la ekzisto de Ĉinujo, Mongolio kaj Manĉoŭkŭo komplikas plu la aferon. Je la fino de novembro ĉijara, kontraŭkominterna interkonsento estis starigata inter Germanio kaj Japanio. Oni kredas ke ankaŭ Italio baldaŭ partoprenos ĝin. Tiamaniere la okcidentaj kaj orientaj aferoj estas kunligataj unuj al aliaj, kaj la plej malgranda bagatelaĵo kiu okazos ĉe iu ajn angulo de la mondo povos disvolviĝi en la tumulton tutmondan. Kaj la mondo mem tute ne komprenas kien ĝi estas forpelata.

Tamen, por ni estas rimarkinde ke nuntempe la nacioj ne staras kontraŭ unu alia per si men sola, sed kelkaj nacioj trupiĝintaj sur unu komuna principo ĉe unu fronto kontraŭstaras alian fronton, kiun konsistigas aliaj nacioj sur alia principo. Nun estas for la tempo kiam la nacioj konservis siajn memstarecojn. Nun ili ne povas fieri siajn sendependecojn aparte de aliaj. Tiun staton ni povas klarigi ke la unuo de internacia vivo jam postlasis la apartajn naciojn kaj formiĝis nova unuo konsistanta el plurnombraj nacioj. Kompreneble nuna cirkonstanco internacia estas malfacila eĉ malagrabla por diversaj kulturaj aferoj, precipe al nia movado, tamen eĉ tiam ni devas

## La pupo babilemas.

### Internacia kongreso de verkistoj, Argentino.

Lastatempe, la internacia kongreso de la tutmonda verkistaro estis okazigata en Buenos Aires en Argentino. Ĉiuj japanaj ĵurnaloj informis, ke ĝi estis tute trankvila. Tamen, la vero estas tute mala. Ĉiuj unuanime decidis kontraŭ la milito. La verkistoj el la faŝismaj landoj estis atakataj. La diskutado estis vigla kaj kaosa. Tio tute superas la intereson de la lasta olimpiado en Berlino. La bona aero de Buenos Airea (Bona Aero) perfekte perdis sian reputacion, ĉar, kie estas realaj vivoj, tie mankas bona aero.

### La lando sen kritiko.

Lastatempe la germana aŭtoritatulo faris la ordonon, kiu malpermesas ĉiajn kritikojn pri artoj. De nun, oni povas nur ĝui tiujn,

rekoni ke la aferoj tutmondaj antaŭeniras sur la vojo de ĉiam pli vasta internaciiĝo. Nacioj kiuj antaŭe supozis sin tute apartaj de aliaj, nun ne povas tion daŭrigi, sed ili estas ĉiun tagon pli profunde envolvitaj en internaciajn katenojn. Kaj la mondo fariĝas tagon post tago pli malvasta.

La mondo en kiu internacieco ludas gravan rolon, tio estas la mondo kiu bezonas esperanton. Malgraŭ la nuna stato tute malfavora por nia movado, neniam esperanto estis tiel bezonata kiel nun. La nuna tempo esenco postulas ĝuste tion kion esperanto intencas doni! Sekve ju pli komplikataj fariĝas la internaciaj aferoj, des pli forte ni sentas la gravecon de nia movado. Kie estas bezono kaj postulo tie nepre malkovriĝos la vojo, kiu, eĉ se estus la plej mallarĝa, ni ne dubas, kondukos nin al nia celo. Kaj ni konkludas ke ni ne devas malesperi kvankam malfavora la cirkonstanco ŝajnas esti. Esperantistoj celas la alporton de paco en la mondon per batalilo de nia lingvo, kiun donacis al ni Zamenhof. Sed ofte oni ridas tion kaj pensas ke neniam ni povus fari tion per esperanto sola. La nuna cirkonstanco postulas pli fortan rimedon ol la lingvo internacia, nun la pensoj de esperantistoj fariĝis nenio pli ol sonĝo de fantaziemuloj, kaj kion ili pensadas estas tro simpla kaj eĉ tro naiva por doni ian efikon al la reala mondo. Jes, vere nia penso estus naiva. Tamen ni opinias ke vere naivaj pensoj enhavas en si elementan pravecon kiun eĉ nekleraj homoj povas konsenti. Nia movado ne estas komplikata teorio, kion oni povas kompreni nur post longa diskutado, sed kontraŭe ĝi estas simpla realo, kio estas tute klara al ĉiuj homoj, kaj ĝi postulas nenian demonstracion kiel matematika aksiomo. Niaj antaŭuloj penadis evoluigi la movadon ĝis nuna tempo, kaj nun ni sentas nian devon pliantaŭenmarŝadi kontraŭ nuna malfacila stato.

Por tion plenumi ni proponas antaŭ nia samideanaro tutmonda, ke ni okazigu la universalan kongreson en Japanio. En Eŭropo esperanto estus jam kunligata kun la ĝenerala ĉiutaga vivo. Tamen ĉe ni, en oriento, nia movado kuŝas ankoraŭ malproksime de ĉiutaga vivo de popoloj. Ankaŭ tiuj, kiuj havas konon pri nia movado, dubas la realan internaciecon de nia lingvo, kiu havas sian originon en eŭropa vivo. Tiel la granda amaso de orientanoj, kiu inkluzivas la duonon de la loĝantaro tutmonda, ankoraŭ restas nevarbite al nia tendaro, dum la plifortigo de nia fronto estas urĝe postulata. Forĵetu la sektismon, ĉesigu la interbataladon interne de nia anaro! Restas ankoraŭ multe da aferoj pli gravaj, pli urĝaj!

En la civilizo de la mondo ni distingas du ĉefajn fluojn, kiuj apartenas al apartaj devenoj, nome la okcidentan kaj la orientan. Pli iliaj ecoj ni ne intencas detale priparoli ĉi tie, sed la kunfandigo de la du civilizoj kaj la starigo de unu nova perfekta estas, laŭ nia opinio, ne sole unu el la gravaj aferoj, kiujn ni esperantistoj devas plenumi, sed tio estas ankaŭ problemo, kion la nuna epoko devas solvi. Japanio staras ĉe la vojkruciĝo de ambaŭ civilizoj, kaj ĝi ankaŭ gvidas la kulturan vivon de orientaj popoloj. Tie okazigi la universalan kongreson kaj alvoki al la loĝantoj tieaj signifas samtempe la enkondukon de nia movado en la ĉiutagan vivon de la tuta orientanaro. La esperanto-movado, kvankam ĝi nomas sin internacia, tute forgesis ĝis nun la ekziston de orientaj popoloj. Se la movado restus ankoraŭ nur inter la proksimaj blankuloj,

---

kiujn la aŭtoritatulo donas kaj propagandas laŭ sia gusto. La artoj estos nur por kaj kontrolataj per la rutino de la nuna reĝimo.

Kaj la rezulto? La popolo malhavos kritikon pri bono kaj malbono. Ili ne gvidos sin, sed nur sekvos blinde kaj idiote. Ĉar, kie mankas libera diskuto, tie mankas progresemo. La nuna gvidanto ĝisvivos cent jarojn. Jam la centunuan jaron, Germanlando disfalos pro la manko de la forto unuiga. Jen, la malo de tio, kion celas la nuna gvidanto.

La pruvo, kiu montras la mizeran kapon de la gvidanto! Ve al la popolo gvidata de tiu! Jen, kial necesas la kritikado.

Kaj kial necesas propagandi la stultecon al la tuta mondo?

Kaj plue, ke oni devis fari tian ordonon, montras aliflanke, ke ne ĉiuj germanoj (jam ne parolante pri la germanoj forpelitaj eksterlanden) aprobas la nunan gvidanton. Ve al la gvidanto!

## Oni ŝparis flagojn, ktp.

Italujo kaj Japanujo manpremas. Pro tio estas la tri kondiĉoj. Unu el ili estas, ke Italujo konstruos konsulejon en Mukdeno en Manĉoŭkŭo. Mi ankoraŭ bone memoras, ke la Ligo de Nacioj unuanime kontraŭis, kiam Manĉoŭkŭo fariĝis sendependa ŝtato. La vorto "unuanime" signifas, ke ankaŭ Italujo partoprenis la kontraŭstaron. La nova konsulejo efektive signifas la agnoskon al Manĉoŭkŭo. Kia ŝanĝo de fakto okazis dume, rilate al Italujo? Nenio, krom tio, ke Italujo kontraŭ sia lasta kontraŭo forrabis Etiopion en tagluma heleco. La manpremoj estis plenumataj absolute sekrete kaj sendepende de la popoloj, ke la japana popolo, kiu tre ŝatas flagojn, povis ŝpari aĉeti la flagojn por la memoriga tago.

La alia efiko.

Politiko baziĝas sur la reganta ideologio aŭ la nacia spirito. Ĝis nun ĉiu popolo fieris *sian unikan nacian* spiriton, kiu – laŭ ili – regos la tutmondan spiriton kaj kiun ili devas gardi per siaj vivoj. Nun, manpremas la germana faŝismo (stultmontrismo) kaj la itala (rabismo) kaj la japana (kaŝismo). Tio pruvas, ke la unikaj brilaj spiritoj identas aŭ almenaŭ havas ion komunan unu de la alia.

ĝi neniam meritos je sia nomo.

Multaj kontraŭdiroj ankaŭ sin trovas por la okazigo de la kongreso en Japanio. Sed tiuj plejparte baziĝas nur sur la malproksimeco de la loko. Por ekzemple S-ro Goldsmith, nova direktoro de UEA skribis al JEI : " . . . . ankaŭ ni priparolis la eblecon iam okazigi kongreson en Japanujo kaj aliaj malproksimaj landoj. Ni opiniis, ke almenaŭ dum la venontaj kelkaj jaroj, tio ne estus ebla, ĉar en Japanujo ekzemple nur povus ĉeesti samideanoj el Ĥinujo, Japanujo, Usono kaj du tri aliaj landoj. Ni povas kalkuli, ke maksimume 10 povus veni el la tuta Eŭropo . . . . . ". Ĉu nura malproksimeco de la loko povus esti ia preteksto en tia *internacia* afero ? De kie oni pretendas ke iu loko estas malproksima ? Se Japanio estas malproksima de Eŭropo, ankaŭ Eŭropo estas malproksima por ni orientanoj. Li diras ke povos kunveni samideanoj nur de Ĉinio, Japanio, Usono kaj du tri aliaj landoj. Sed ĉiufoje ĉe la kongreso nur kunvenas samideanoj el Anglio, Francio, Germanio kaj du tri aliaj landoj, ĉu ne ? Ŝajnas plie ke li ankaŭ opinias ke kie pli ol 10 da eŭropanoj ne povas kunveni, neniam ekzistos la kongreso. Ĉu la universala kongreso de nia esperanto-movado estus propraĵo de eŭropanoj solaj ? Por eŭropanoj ĉiujare la kongreso estas okazigata kaj ili ĉiam povas ĝui tion. Sed por ni orientaj esperantistoj neniam venos la okazo dum nia tuta vivo, kaj tio estas nur pro tio ke povos ĉeesti nur 10 eŭropanoj ! Ni deziras demandi al S-ro Goldsmith, ĉu iam ekzistis kongreso, kiun partoprenis pli ol 10 japanoj ? Se la kongreso en Japanio nepre postulas pli ol dek eŭropanojn, ni devas kontraŭdiri al ĉiujara kongreso kiu estas okazigata nur en eŭropo, ĉar tiam ni rajtas ankaŭ postuli ke pli ol 10 japanoj devas ĉeesti la kongreson, kaj tion neebligas la malproksimeco de eŭropo. Antaŭ ĉio oni devas forĵeti la nunan pensmanieron bazitan sole sur la vivo de eŭropanoj ! Ankaŭ ni ne povas kompreni la nunan tumulton inter Ĝenevo kaj Londono, pri UEA. Se estus prava la insisto, ke la prezo de vivrimedoj estas pli malkara en Londono, tiam ni intencas konsili al la aŭtoritatuloj de UEA, ke ili devas translokigi la oficejon al Japanion, kie la prezo estas ja la plej malkara en la mondo !

Pri la realiga metodo, ni opinias la plej bona ke ni utiligu la okazon de la Olimpiaj ludoj, kiujn oni okazigos en Tokio en la jaro 1940. En tiu sama jaro multaj aliaj kongresoj internaciaj okazos en Japanio, kaj espereble diversspecaj faciligaj rimedoj estos aranĝataj por la vojaĝontoj de eŭropo kaj aliaj mondpartoj. Tial ni ne dubas ke multaj gesamideanoj eŭropaj ankaŭ vojaĝos al Japanion por la Olimpiaj ludoj kaj la nia kongreso, ankaŭ por vidi la vidindaĵojn kaj la belajn pejzaĝojn de nia lando. Kredeble la antaŭzorgoj de S-ro Goldsmith pruviĝos senbaza kaj bagatela trovante multege pli ol 10 eŭropajn gesamideanojn en la Tokia universala kongreso.

Ĉiuokaze, ni ne zorgas, kiajn ajn kontraŭdirojn prezentus antaŭ nin la pseŭd-esperantistoj. Ni turnas nin nur al la seriozaj gesamideanoj tutmondaj, kiuj bone komprenas la veran signifon de nia movado. Karaj gesamideanoj ! Koramikoj niaj ! Ni bezonas vian subtenon, kuraĝigu nin !

---

## Esperantista Vivo

### S-ro Tanaka al Nagasaki.

S-ro Tanaka aŭ s-ro T. Miyosi, la kiota samideano, la konata desegnisto, nun estas invitita de la ŝipkonstruejo en Nagasaki. Li laboras tie kiel projektisto. La urbo Kioto denove sendas sian elitan delegiton.

La urbo Kioto estas konata kiel la klasika urbo. Ĝi tamen estas konata ankaŭ kiel la plej progresema urbo en Japanlando, ankaŭ laŭ la vidpunkto de esperantismo. Ĝi ja nutris multnombrajn praktikajn esperantistojn, kiuj estas poste eksportitaj al ĉiuj partoj de Japanlando. Kioto estas ĉiam la unua en ĉiaj aferoj :– japana-esperanta vortaro, esperanta gramofondisko, esperanta libro-vendejo, scienca libro, reprezenta literatura libro, ktp., ktp ktp.

Ni esperas multon de la samideano en la estonteco.

### UEA aŭ IEL ?

1. Hodler kriis :– Universala Estas Amo, UEA ! Kaj li fondis ĝin per sia kapitalo, en Svisujo.

2. Malriĉaj naciaj societoj kontraŭis kaj kriis :– Uzurpu Fonditan Entreprenon ! UFE !

3. UFE rabis UEA kaj alprenis la nomon UEA. Tamen, la kaso jam estis elĉerpita. Do, la nova UEA volis kaŝi sin en Londonon.

4. La leĝo de Svisujo malpermesis la transporton de la mizera restaĵo de UEA en Svisujo. Sed la forkurintoj spite provas vivi en Londono IEL, dirante :– Intrigo Estos Laborita IEL.

---

## Anteno

### Riĉigu nian literaturon

**Nakahara-Syûzi**

En la jarlibro de u.e.a. de 1936 oni vidas 36 landajn asociojn kaj 77 vivantajn gazetojn. Se ĉiu landa asocio havas la eblecon vendi po dek ekzemplerojn da ia libro nove aperanta, kiu eĉ ne estas tre ĝenerala, oni povas vendi kaj eldoni eĉ tre malfacilajn eldonaĵojn, kiujn oni ne povas esperi eldoni ekonomie en ia ajn nacia lingvo.

La skribanto de la artikolo jam spertas 20 jarojn kiel eldonisto precipe de kemiaj libroj en la nacia lingvo japana. Kompreneble kemiaj libroj ne estas tiel facile vendeblaj kiel tiuj de la ĝenerala speco. Tamen, se mi povas supozi la eblecon vendi pli ol 500 ekzemplerojn, tuj mi komencas la eldonan aferon.

Mi jam tro longe spertas en la eldona kampo mizera en nacia lingvo. Tial mi decidas en la koro, ke se mi eldonas librojn sur la internacia bazo per esperanto mi povos agi pli facile ol antaŭe sur la nacia bazo.

La nombro 500 en la eldona kampo ne estas tiel malfacila afero, se ĉiulandaj esperantistoj klopodas kapti po pli ol 15 aĉetantojn en unu nacio por riĉigi siajn literaturaĵojn. La forto de tia klopodo fariĝos mirinda prospero en la tutmonda eldona kampo.

La esperantistoj kaj la eldonistoj en la tuta mondo klopodu al tia klara bona afero kaj pli facile realigu nian celitan esperon.

## Kvankam belarta sezono venis.

**T. Miyosi**

Jam unujaro pasis ekde komenci antaŭa ministro de klerigado ĝeneraligon kaj kontrolon de japana pentrorondo. Kian rezulton aperas en nova scenejo? Certe la pentrorondo okazigis solvmovon kontraŭ la volo registara, malluma neorda fluo — tro freŝa ŝlima fluo aperas ĉi tie. Antaŭe multe da intelektulo sufiĉe divenis tian staton, nur estas malkaŝo de io puŝoplenan, nur estas la elemento de finguro netrompita de nunaj pentroartistoj.

Intertempe reflektaĵo al ĝenerala publiko estas la falo de konfido al pentroartistoj kune kun prestiĝo de aŭtorilatulo. Oni sentas impreson kiel la raso avarega nur nomon kaj profiton spite de iliaj kutimaj diroj kaj agoj. Kreskintaj pentristoj en la socio de liberisma ekonomia mekanismo havas nenian detenon en sia ideo kaj ago, kaj la socio ĉiam dediĉas la liberon al ili plie de produktosintenado neordonas leĝo kaj reguloj. Pri originale verki kaj uzi tion, ankaŭ libero ekzistas al ili, ĉar nuna socia mekaniko havas bazon al libera konkursismo, ĉiuj agoj de individuo neprofitas alian sed agoj senĉese kaŭzas akiri utilon mem. de vidpunkto morala niaj pentristoj posedas nenion en sia vivo sub la masko de la arto estas sankta avidulo de propra profito kaj egoismo. Pri liberismaj pentristoj, oni povas diri kiom da kapoj tiom da opinioj. Certe ĉiupersone hvas kaprican opinion, faras egoismajn agojn kaj publikiĝas laŭplaĉan pentraĵon.

La multaj pensas ke konduti proprovole en la vivo sen prizorgojaliajn estas metodo pro produkti pli bonan artaĵon.

Ĉu estas malfacila trovi komunan profiton aŭ malprofiton inter ili, ne! ili egale volas nomon kaj profiton.

Antaŭa ministro de klerigado pereigis malnovan grupon por selekto de diversaj privilegiuloj inter iliaj grupoj celante refreŝigi malbonan rezulton de multe da jaroj en *registara ekspozicio kaj nove organizis novan kun kompetentuloj eksterregistaraj. Li projektis enirigi freŝan aeron al nova registara ekspozicio.

Por nur privata deziro ili kuraĝe starigis kune kun havantoj de sama profito. Kunligante varmege kontraŭstaris.

Liberismaj pentristoj estas dezirantuloj simple pligrandigon kaj plenigon de la privata avareco, ĉia manielo ŝanco kaj organizoj estas utiligata por tio, tie la semo de predilekcio estas semata. La signo de ekspozicio, sub la nomo de artmovado kaj gvidado de la sentimento naciana, sin turnas al la vastigo de potenco kaj la etendiĝo de profito de pentristoj mem.

Eksterregistara ekspozicio similas al foiro de la komercaĵo kaj registara ekspozicio montras distribuostaton de la influeco direktanta, menciita sintenado vere estas nekaŝebla karakterizaĝo de nuna liberisma socio kaj pentristoj. Kvankam nuna ministro penadis, okaziganta ekspozicio (de nova registara ekspozicio) en belarta urbo Kioto neniam donas al ĉiuj elkoran kontenton. male senhomecon kaj dezertecon.

Sole teknika lerteco aktive furiozas en ĉiu ĉambro de ekspozicio, tute sen ideo kaj intenco de pentroarto.

Avangarda artisto kritikis tion, mi sentas vagadi ĝardenon de la tombejo, delikataj floroj konkuras belecon por kapti min pere de la senviveco. ho! kompatinda malsana aero! liberismaj pentristoj ne sentas neceson de idealo kaj teorio. Kiam oni atente rigardas postsignon de iliaj kunigoj aŭ disigoj, sendube povas vidi ke ili grupigas kun akirantoj de privilegio kaj ne, ne estas pro kaŭzo de la diferenco de idealo kaj ismo de arto. Ankaŭ la vorto de nuna ministro de klerigado s-ro Hirao estas neforta de nuna situacio de socia tendenco. Li devas pensi, ĉu povas servigi direkte al nia vivo, se kiamaniele kontrolus kaj klerigus.

Utiligante iliajn egoismojn, egale kaj unuforme kontentigu iliajn proprajn dezierojn, se ne, preferu streĉan kontrolismon de belarta kampo decidante al si. Devas klarigi la signo de kontrolo kaj kontrolu pere de enradikigo de idealo kaj teorio al moraligi, socialigi, de egoismo al altruismo ekzistas peco da vera signo de kontrolismo, rapidordigi laŭ la kapo de famaj pentristoj estas negrave kaj necese por kontrola problemo.

Se pentristoj havus firman kredon por ke la kontrolismo estas obstrukcata por arta progreso kaj plibonigo, tiam trankvile foriru kaj defendu sin aŭ marŝe fortiku la kunligon kontraŭ de la kontrolismo.

* Ekspozicio de Imperia Belarta Instituto.

Jam la trian jaron monata
Sendependa gazeto
TEMPO
traktas realajn vivon kaj socion, kun amuzo kaj satiro tute en Esperanto.
Jarabono: 1.20 jenoj aŭ 10resp.- kuponoj.
LIBREJO KANIYA
Teramati-Ebisugawa, KIOTO Japanlando. Poŝtĉekkonto: Osaka 23404

Laŭleĝe deviga teksto japanlingva
定價一部金拾五錢（送料五厘）一ヶ年送料共金壹圓
昭和 11 年 12 月 23 日印刷 昭和 11 年 12 月 25 日發行
TEMPO 編輯、發行者 中 原 脩 司
京都市寺町夷川上ル常盤木町四六
印刷者及印刷所 仙臺市國分町八八番地 笹 氣 印 刷 所
發 行 所 國際時事新聞社 京都市寺町夷川
電話上 2555 振替大阪 41036, 23404

KUL